

JUNIO 2011

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2011:3

Svenska Esperanto-Kongressen Framtidsfrågor och historia



Både framtidsfrågor och historia fanns med på svenska esperanto-kongressen.

En ny lärobok - Esperanto direkt - och en ny bok om esperantos historia i Sverige släpptes.

Till vänster signeras den senare av författaren Katalin Kováts och av Dorica, dotter till huvudpersonen.

Foto: Olof Pettersson,



Språkråds- dagen

Lena Ekberg från Språkrådet (t.h.) talade om svårigheter i det svenska språket för andraspråkstalare.
Foto: Olof Pettersson



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Junio 2011 • 99-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Pingvinpress Grafiska AB

Prenumeration 2011: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2011:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09, mobil 070-767 54 55

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,
754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

Stoppdatum Utkommer senast

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Tatu Lehtilä



Kie vi naskiĝis kaj loĝas?

En Turku en Finnlando. Mi loĝis tie dum tri jaroj. Tiam mia familio transloĝiĝis al Usono por unu aŭ du jaroj. De tie ni transloĝiĝis al Svedio. De tiam ni loĝas en Sollentuna.

Kie vi studas?

Mi studas la trian jaron en la Rudbeck-gimnazio en Sollentuna en la natursciencia programo. La sekvan jaron mi planas studi lingvistikon en la universitato de Stokholmo.

De kiam vi interesiĝis pri Esperanto?

Mi ne memoras de kiam mi interesiĝas. Mi multfoje aŭdis pri ĝi. En la gimnazio ni devas fari projekton en la tria jaro. Mi elektis lerni Esperanton. Unue mi uzis la retpaĝon pacujo.net Tie estas senkosta anglalingva Esperanto-kurso kun instruisto. Dum unu semajno mi faris la dek lecionojn de tiu kurso. Tie mi

lernis la bazan Esperantan gramatikon.

Poste mi transiris al lernu.net Mi komencis per la tieaj meznivelaj kursoj. Mi ankaŭ faris la meznivelan lingvo-ekzamenon. Iom poste mi iris al Esperanto-Centro en Stokholmo por povi paroli Esperanton. Tie ĉi mi partoprenis kunvenon kun dek aŭ dek kvin esperantistoj. Mi estis kontenta ke mi sufiĉe bone parolis Esperanton.

Post tio mi sukcesis fari la altnivelan lingvo-ekzamenon en la reto. Mi estis tre kontenta pri tio kaj per tio finis la projekton.

Ĉu vi havas iajn taskojn en la Esperanto-movado?

Post mia ekzameno ĉi en www.lernu.net mi ricevis la demandon ĉu mi volas fariĝi lingvo-helpanto en la kurso, kaj tion mi jesis.

Ĉu vi havas familion?

Mi loĝas kun patro, patrino kaj havas du fratojn. Nia hejmlingvo cetere estas la finna.

Kiu estas via favorata libro?

Ĝis nun mi legis neniun libron en Esperanto, sed nur uzis la lingvon en interreto.

Ĉu ekzistas aliaj interesoĵoj pri vi?

Mi parolas sep lingvojn. Bone la finnan, la svedan, la anglan kaj Esperanton kaj eble la francan, iom la germanan kaj latinon.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

Fotis: Olof Pettersson

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Tiu ĉi numero de La Espero grandparte estas skribita dum la Sveda Esperanto-Kongreso en Stokholmo. Dank' al mia portebla komputilo mi povis skribi en la revuon dosieron eĉ dum la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio.

Fari revuon en nia tempo estas tute alia afero ol antaŭ kelkdek jaroj. Kiam mi en la 1970-aj jaroj fariĝis redaktoro de ktp, kiu estis la revuo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo mi tajpis ĝin per tajpilo, kaj aliaj homoj devis multoblige ilin per stenciloj.

Mi deziras al vi bonan legadon. Ne maltrafu la eblecon partopreni la ĉi-somerajn Esperanto-kursojn kaj la Universalan Kongreson en Kopenhago.

Leif Nordenstorm

Roland Lindblom elektiĝis prezidanto la trian fojon

La sveda esperanto kongreso okazis ekde la 13-a ĝis la 15-a de Majo en Stokholmo. La kongreso estis unu el la plej grandaj svedaj Esperanto-kongresoj dum la lastaj dek jaroj. Sur la listo de partoprenantoj aperis 67 nomoj, sed ankoraŭ kelkdek homoj partoprenis la kongreson.

Prelego pri Tiberio Morariu

Partoprenis gastoj el Germanio, Finnlando, Rusio, Hungario, Greklando kaj Italio. Vendrede vespere okazis neformala kunveno en Esperanto-Centro. Estis ebleco aĉeti librojn kaj libere interparoli.



Katalin Kováts kaj Dorica, filino de Tiberio Morariu. Foto: Olof Pettersson.

Sabate la programo okazis en la kongresejo Cybergymnasiet apud Odenplan. En tiu gimnazio cetere troviĝas du esperantistoj inter la instruistoj. Katalin Kováts vigle prelegis pri Tiberio Morariu, kiu dum la 1930-aj jaroj instruis Esperanton en diversaj lokoj en Svedio. Ŝi komencis per la agado de Andreo Cseh, kiu kreis la Cseh-metodon, kiu estas naturmetoda pedagogiko, kiu utiligis ekz. korusan ripetadon. Ĉeestis la prelegon ankaŭ la filino de Tiberio Morariu, Dorica, kiu ricevis la unuan ekzempleron de la libro "Stelamantoj en ora nordo", kiu prezentiĝis tuj post la prelego.



Jarkunveno de SEF

Sabate posttagmeze okazis la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio. Gvidis la kunvenon la prezidanto de SEF, Bengt Olof Åradsson. Alvenis oficialaj salutoj de la landaj Esperanto-federacioj en Finnlando kaj en Togolando kaj de la loka klubo en Sankt-Peterburgo, kiu cetere estis reprezentata en la kongreso per du personoj. La jarraporto estis akceptita, kaj ni povis ĝoji pri multspeca aktiveco menciita en la raporto.

Bengt Olof Åradsson deziris retiriĝi de sia posteno kiel prezidanto de SEF. Roland Lindblom estis elektita prezidanto por unu jaro. Tio estos lia tria periodo kiel prezidanto de SEF. Trovi anojn por la elektoprepara komisiono postulis multe da tempo.



Eksprezidanto de SEF: Bengt Olof Åradsson. Foto: Olof Pettersson.

Estis akceptita propono de Kaisa Hansen organizi efikan libroservon por Esperanto-libroj en Svedio. Ulla Luin proponis novan statuton, kiu signifas ke ĉiu membro – ne nur reprezentantoj de kluboj – havos voĉdonrajton en la jarkunveno de SEF. Ankaŭ ĝi estis unuanime akceptita de la jarkunveno.


La klubo en Helsingborg invitis la jarkunvenon por 2012. La dato estas fiksota.

Leif Holmlund en Skellefteå ekde 2012 havos la taskon esti peranto de UEA post tre longa periodo kiam Lisbet Andréasson

faris tiun laboron. La jarkunveno esprimis sian dankon al Lisbet por tiu longa laboro. Bengt Nordlöf surloke proponis ke La Espero fariĝu revuo ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por aliaj homoj, kiuj interesiĝas pri lingvoj.

Kunveno pri Esperanto-Gastejo

Okazis informkunveno pri Esperanto-Gastejo en Lesjöfors en kiu Bengt Nordlöf klarigis ke la domo mem nun estas en pli bona kondiĉo ol iam antaŭe, ĉar oni kun helpo de pluraj personoj riparitis i.a. la tegmenton de la domo. La problemo ne estas la domo mem. Tamen alia problemo estas ke estas malfacile allogi estraranojn, ĉar ni bezonas kompetentulojn pri domaj aferoj.



Aktivuloj de Esperanto-Gastejo: Hans Häglund kaj Lennart Svensson. Foto: Dan Palm.

Tre grava por Esperanto-Gastejo estas la ralio, kiu okazas frue en ĉiu jaro. Tranoktoj dum ĝi donas multe da enspezoj. Ankaŭ venas vizitantoj dum la Vansbro-naĝado kaj personoj kiuj interesiĝas pri geologio en la apuda vilaĝo Långban.

En tiu ĉi somero okazos ankaŭ renkontiĝo de Esperantaj familioj kaj vizitgo de grupo de pli ol 30 moskvaj esperantistoj.

La somera lingvo-kurso estas grava aranĝo, kiu revenas ĉiujare.

SVEDA ESPERANTO-KONGRESO

ILEI-SE

Okazis jarkunveno. Raporto bedaŭrinde mankas.

Eldona Societo Esperanto

En la jarkunveno de nia eldonejo la estraro reelektiĝis. La estraro povis raporti pri la planoj pri estonta eldonado. Estas planata novelaro, konsistanta el noveloj originale verkitaj en Esperanto, tradukitaj en la svedan. Daŭras laboro pri nova eldono de la malgranda vortaro kaj Esperanto-sveda vortaro.



Agrabla etoso en la Turka Salono. Foto: Dan Palm.

La sabata vespermanĝo okazis en la "Turka salono" en centra Stokholmo. Ĝi evidente estis nekonata ĝis la kongreso eĉ por ankaŭ por multaj Stokholmaj esperantistoj. Kantis por ni Natasha kaj Andreo Bertse.



Natasha kaj Andreo. Foto: Olof Pettersson.

Dimanĉe matene okazis diservo kaj jarkunveno de la sveda sekcio de KELL. Tiuj, kiuj ne partoprenis la diservon, povis partopreni kvizon pri aktualaj okazaĵoj en Esperanto.

Esperanto ne tre eŭropa

Okazis ankaŭ svedlingva prelego de la lingvisto Mikael Parkvall pri "Kiel eŭropa estas Esperanto? Tipologia studo". Kelkaj homoj kritikis Esperanton, opiniantaj ke

ĝi estas tro Eŭropeca por la rolo kiel monda lingvo.



La nova SEF-prezidanto Roland Lindblom kun la gastoj Katalin Kováts kaj Mikael Parkvall. Foto: Olof Pettersson.

Mikael Parkvall science studis la aferon kaj konkludis ke Esperanto ja estas iom eŭropeca, sed atentinde malpli tia ol la eŭropaj lingvoj mem. (La scienca studo aperis en la revuo *Language Problems & Language Planning* 34:1 2010).

Li ekzamenis 180 lingvojn kaj iliajn similecojn al Esperanto. Plej similaj al Esperanto estas la rusa, la angla kaj la franca.

Kaj cetero...

Wim Posthuma montris filmon pri vizito en Togolando kaj principe en la lernejo Instituto Zamenhof, kiu estas lernejo, en kiu Esperanto estas instruata lingvo. Ĝi havas 450 lernantojn en diversaj aĝoj ekze la plej junaj ĝis gimnazio.

Ni dankas al la Stokholmaj esperantistoj, kiuj aranĝis la kongreson. Ĝi estis sukcesa kaj allogis iom pli ol partoprenantoj ol ordinare.

Leif Nordenstorm



Ole kaj Kaisa Hansen. Foto: Dan Palm.

Novaj estraroj

Sveda Esperanto-Federacio

Prezidanto: Roland Lindblom
Estraranoj: Olof Pettersson, Ann-Louise Åkerlund, Agneta Emanuelsson, Dan Palm.
Anstataŭantoj: Siri Bartusch kaj Bengt Olof Åradsson.

Eldona Societo Esperanto

Prezidanto: Leif Nordenstorm
Sekretario: Joakim Enwall
Kasisto: Tomas Jansson
Anstataŭantoj: Andreas Nordström kaj Per-Olov Johansson

Sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia

Prezidanto: Mats Landfors
Sekretario: Bengt-Olof Åradsson
Kasisto: Agneta Järström
Anstataŭanto: Leif Nordenstorm

Esperanto-Gastejo

Lennart Svensson, Anders Rylander, Wim Posthuma, Martin Stridh kaj Marianne Andersson.
Anstataŭanto: Siri Bartusch, Douglas Draper.
Eksterordinaraj membroj: Bengt, Anita Dagmarsdotter.

Aŭtunaj Tagoj okazos norde kaj internacie

La Aŭtunaj Tagoj de EAF okazos ĉijare en la duobla urbo Tornio-Haparanda. Tio estos ankaŭ parte temo de la kultura-kleriga programo de la Tagoj. Temo al la turisma programo donas la unika naturo kaj malmulte konata historio de la regiono.

Tempo: Semajnfino 10-11.9.2011. Longan vojon el suda Finnlando estas oportune fari per nokta trajno. Loko: Haparanda, hotelo Cape East (ni pardonu la lingvon), la plej orienta loko de Svedio, vidu <http://www.capeeast.se>

Prezo: indikota, sed ni kalkulas laŭ la favora oferto de la hotelo, ke paketo de plena pensio plus programo (aliĝkotizo) restos sub ducent eŭroj. Sekvu pluajn informojn en www.esperanto.fi kaj en Esperantolehti.

Flerspråkighet på språkrådsdagen

På årets upplaga av Språkrådsdagen som hölls i Folkets hus på Barnhusgatan i Stockholm den 12 maj deltog – åtminstone enligt deltagarförteckningen – närmare 200 personer. Temat denna gång var flerspråkighet, och föredragen tolkades även till teckenspråk.

Dagen inleddes med att Ingrid Johansson Lind, generaldirektör för Institutet för språk och folkminnen, talade om hur intresset för språk och språkpolitik verkar öka, både hos allmänheten och hos myndigheter. Därefter talade Lena Ekberg, chef för Språkrådet, talade under rubriken *Prata som en svensk?* om hur idiomatiskt språk kan vara problematiskt även för avancerade andraspråkstalare av svenska. Hon gav också exempel på hur betydelsen av uttryck kan förändras, att en *björntjänst* för många betyder "en stor tjänst" snarare än något som gör skada.

Tecken på tillbakagång

Tommy Lyxell, också från Språkrådet, talade om teckenspråket. Enligt olika uppskattningar finns det ungefär 12 000 som har svenskt teckenspråk som sitt förstaspråk i Sverige, och mellan 30 000–100 000 som använder det i någon utsträckning. Men även om teckenspråket skyddas av språklagen, och hörselskadade har rätt att lära sig att använda och utveckla teckenspråket, har det de senaste tio åren skett en nedgång av antalet elever inskrivna i skolor med teckenspråksundervisning. Dels finns dessa skolor bara på en del orter i landet, dels kanske inte föräldrarna har tid att lära sig teckenspråk, eller tycker att det är svårt. Samtidigt har ny teknik som cochleaimplantat gjort det möjligt för många att återfå något slags hörsel. Paradoxalt nog finns också en växande trend, "baby signs", att lära hörande spädbarn teckenspråk som ett sätt att stimulera deras

språkutveckling innan de lärt sig tala, medan döva barn inte får lära sig teckenspråk förrän i förskolan.

Internationella universitet

Hedda Söderlundh från Uppsala universitet, som på eftermiddagen även tilldelades Erik Wellanders pris tillsammans med Maria Lim Falk från Stockholms universitet, talade om sin doktorsavhandling. Hon har undersökt kurser i fysik och ekonomi, där undervisningen – åtminstone enligt kursplanen – ges på engelska för att locka fler utbytesstudenter och ge universitetet en mer internationell prägel. I praktiken visade det sig dock att de svenskspråkiga studenterna pratade svenska sinsemellan och med läraren, medan föreläsningar eller redovisningar hölls på engelska, eller på svenska om inga utbytesstudenter var närvarande.

Hon konstaterade också att de svenskspråkiga studenterna använde engelska för att prata med utbytesstudenterna, och inte t.ex. tyska, franska eller spanska: man försöker vara internationell och locka utbytesstudenter med olika bakgrund, men begränsar sig till att bara använda engelska.

Olof Pettersson



Tommy Lyxell (t.v.) diskuterade teckenspråk med moderatören John Christinsson.

Foto: Olof Pettersson

Nova estraro en Upsalo...

Esperanto-Societo de Upsalo elektis novan estraron: Leif Nordenstorm (prezidanto kaj sekretario), Martin Kjellin (kasisto) kaj Christer Kiselman.

La societo cetere estas la dua plej malnova Esperanto-societo de la mondo post Nürnberg.

kaj en Skövde

Skövde Esperantoklubo havis sian 79-an jarkunvenon en la klubejo. Proksimume duono de la 21 membroj patroprenis.

Hilgon Frisk volis rezigni kiel klub-prezidanto. Karl-Gustaf Gustavsson estis elektita nova prezidanto. Reelektitaj estis Solveig Bertilsson, kasisto, Börje Andersson, sekretario kaj Carl-Eric Ohlsson. Hilgon Frisk estis reelektita bibliotekisto.

Dum la jaro du membroj mortis, Kurt Frisk kaj Siv Bakay. Kurt Frisk estis kultjara vicprezicanto, kaj lia morto signifas grandan perdon por la klubo.

Dum la jaro estis kunvenoj ĉiun monaton kun variaj programoj. Ses membroj partoprenis literaturkurson.

Informkunvenoj estis aranĝitaj en la urba biblioteko kaj en la klubejo por allogi novajn membrojn. Precipe oni turnis sin al junularo.

Börje Andersson

Instituto disdonis librojn

Sveda Esperanto-Instituto disendis 206 ekzemplerojn de la libro "Esperanto. En introduktion" verkita de Bertil Nilsson al diversaj bibliotekoj en Svedio. Temas precipe pri ĉefaj urbaj bibliotekoj en Svedio.

Ĉu via biblioteko ricevis la libron? Skribu al Kaisa Hansen kaisa@esperanto.se kaj demandu.

DEZIRAS

KORESPONDI

66-jaraĝa emerita juĝisto deziras korespondi pri diversaj temoj, precipe pri historio, kulturo, familia juro, interlingvistiko, sveda klasika musiko. Antoni Myszakowski, P.K. 26, PL-56-400 Olesnica, Pollando. Amyzaakowski@02.pl

2012 en Hanojo Novelaro premiita por 2010

La Kongresa Fakto de UEA fiksas la datojn de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu laŭ la pli frua decido de la Estraro de UEA okazos en la vjetnama ĉefurbo Hanojo. La 97-a UK disvolviĝos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012.

La Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães vizitis Hanojon fine de aprilo. La ĉefa parto de la kongresa programo okazos en la hotelo Meliá. La ejo de la inaŭguro kaj aliaj programeroj, en kiuj samtempe partoprenos la tuta kongresanaro, estos la Palaco de Kulturo. Ĝi troviĝas en piedira proksimeco de la hoteloj, kiujn UEA ofertas al la kongresanoj.

La preparlaboroj fare de la Loka Kongresa Komitato progresas glate kaj kun granda entuziasmo, konstatis Clay Magalhães dum sia vizito. Li konatiĝis i.a. kun eblaj kongresejoj kaj kun loĝigaj eblecoj. Li ankaŭ partoprenis en kunsido de LKK kaj pasigis multan tempon por konsili ĝiajn membrojn pri plej diversaj organizaj detaloj. KKS vizitis ankaŭ la infanĝardenon, kie okazos la 43-a Internacia Infana Kongreseto kaj kies direktorino estas aktiva esperantisto.

Filmo pri UEA-estrarkunsido

En la filmjurnalo UEA viva aperis nova eldono, en kiu prezidanto Probal Dasgupta, vicprezidanto Claude Nourmont kaj ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak rakontas pri la lasta kunsido de la Estraro de UEA. La kunsido okazis de la 15-a ĝis la 17-a de aprilo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Temas pri n-ro 9 en la serio de filmjurnaloj de UEA en YouTube. Per ĝi la serio rekomenciĝis post longa paŭzo pro la studoj de la volontula redaktoro Francisco Veuthey.

www.uea.org



La abonantaro de Literatura Foiro elektis la novelaron Vizaĝoj, al kiu kontribuis dudek naŭ aŭtoroj, kiel Verkon de la Jaro 2010. La esperantan PEN-premion do gajnis, unuafoje, kolektiva verko.

Unu el la decidaj faktoroj povus esti la persona prestiĝo de la aŭtoro respektive la reputacio de la eldonejo. Sed ankaŭ tiuj ne helpis al István Nemere, Manuel de Seabra kaj Trevor Steele, respektive FEL kaj Sezonoj, ĉi-foje.

La decida faktoro estis la intereso de la publiko pri la panoramo de la esperanta novelarto dum la unua jardeko de la nuna jarcento, laŭ mozaiko kie ne mankis eroj el ĉiu menciita aŭtoro. Evidente la abonantaro de LF trovis tiun panoramon sufiĉe objektiva, kaj ankaŭ arte nivela.

HeKo

Esperanto en la Babelturo

Ĉi-jare Unesko deklaris la ĉefurbon de Argentino la "monda ĉefurbo de la libro". Ĉi tie okazas la tria plej granda librofoiro en la mondo, kaj ĉi-jare estis konstruita tuta Babelturo el libroj en diversaj lingvoj, ankaŭ Esperanto. Sed pli grava atingo estas la fakto, ke Esperanto eniris la prestiĝan oficialan programon de la aranĝo, kiu okazas en unu el la ĉefaj placoj de la urbo, kaj

estas vaste diskonigata de la tutlandaj amaskomunikiloj. Nome de Argentina Esperanto-Ligo, la profesia instruisto Petra Smidéliusz jam faris sukcesajn prelegojn kaj prezentadojn pri Esperanto tuj apud la Babelturo kaj altiris la atenton de la lokaj amaskomunikiloj.

www.liberafolio.org

UEA membriĝis en Infoterm

La 10-an de majo Universala Esperanto-Asocio subskribis interkonsenton pri kunagado kun Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio. Per tio UEA fariĝis membro de Infoterm, fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI). Infoterm celas i.a. interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp., ĉefe en la kampo de terminologio.

Infoterm devenas el la terminologia esplorcentro, kiun fondis kaj longe prizorgis Eugen Wüster, esperantisto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco. Infoterm funkcias ankaŭ kiel sekretario de la Teknika Komitato TC37 de Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kun kiu UEA havas oficialajn rilatojn jam ekde 1991.

Pri la rilatoj de UEA kun Infoterm kaj la Teknika Komitato TC37 de ISO respondecas nova komisiito, Mélanie Maradan el Svislando. La Estraro de UEA nomumis ŝin por tiu funkcio en sia aprila kunsido.

www.uea.org

LINGVO

Några falska vänner

Falska vänner kallas sådana ord som man lätt kan använda fel när man lär sig ett nytt språk. Sådana finns även för svenska som lär sig esperanto. Här är några exempel som är hämtade från Bertil Wennergrens hemsida: bertilow.com/falsa/ där man kan hitta fler falska vänner:

buroo = "byrå (avdelning av myndighet)". "Byrå" (möbel) = **komodo, tirkestaro**. "Kommod" (möbel med tvättställ m.m.) = **lavomeblo**. "Byrå, kontor" som i t.ex. "advokatbyrå" = **oficejo**. Engelska "bureau" betyder "sekretär" = **letermeblo, skribŝranko**, och "skrivbord" = **skribtablo**.

lenso = "lins (kamerallins, ögonlins, glasögonlins)". "Lins" (ärtväxt och dess frön) = **lento**. Ögats lins heter även **kristalino**. "Linsformad sötsak" = **pastelo**.

rara = "sällsynt och därför värdefull". "Rar, ovanlig" = **maloft(eg)a** (även **rara**). "Rar, älskvärd" = **afabla, dolĉa, kara, ĉarma**.

rektoro = "universitetsrektor, gymnasierrektor". "Rektor" i allmänhet = **lernejestro**. Ordet **rektoro** behövs förmodligen inte alls. **Gimnaziestro** och **universitatestro** är tydligare.

roso = "dagg (droppar på marken)". "Ros" (växt, blomma) = **rozo**. "Ros, rosfeber" (sjukdom) = **erizipelo**. "Bältros" (sjukdom) = **zostero** (även **zostro, zono, zona erupcio**). "Kompassros" = **(vent)rozog**. "Rosa" (färg) = **rozkoloro, roz(kolor)a**. "Dagg, grov tågända med knutar" (gammaldags straffredskap) = **ŝnurbatilo**. "Blydagg" = **plumbobatilo**.

tualetto = "toalett (klädsel, tvättning och påklädnings)". "Toalett, WC, avträde" = **necesejo**.

tableto = "litet bord". "Tablett, tallriksunderlägg" = **submetafo** eller **tablotuketo**. "(Hals)tablett, pastill" = **lozanĝo** (rombformad) eller **pastelo** (rund, linsformad). "Tablett" som medicin = **tablojdo**. "Piller" = **pilolo**.

Leif Nordenstorm



Matlagning nyhet vid 25:e sommarkursen

Årets sommarkurs i Lesjöfors blir den 25:e i ordningen. En nyhet blir då en kurs i matlagning, närmare bestämt för singlar. Speciellt intressant för dem som vill motverka övervikt genom en kost med lite kolhydrater men mycket fett. Naturligtvis blir språket i köket köksesperanto. Matlagningskursen leds av Anita Dagmarsdotter.

Programmet innehåller förstås i första hand språkkurser på olika nivåer. Närmare bestämt nybörjare, fortsättning och konversation. Dessutom i vanlig ordning en barngrupp, nu med deltagare från fem år. Detta är ju ett tillfälle för föräldrar, eller far- och morföräldrar, att få en semestervecka medan "småfolket" kombinerar nytta med nöje och leker på esperanto.

Fem lärare är inbokade för språkkurserna: Kristin Tytgat, Belgien, Tamász Halasz, Ungern samt från Sverige Carl Mäsak, Beatrix Mehdi Strid (barngruppen) och Natasha Bertse. Arrangör är kooperativet Esperanto-Gården.

Snart 40 sommarveckor

Den årliga sommarkursen flyttade till Esperanto-Gården 1997 ifrån Karlskoga folkhögskola, där den då hållits i elva år. Esperantolinjen där byggdes upp och förestods av Lars Forman. Där bedrevs också under samma tid terminskurser med heltidsundervisning i esperanto, veterligen det enda stället i världen där det gått att på heltid studera esperanto och därmed ordentligt lära sig språket. (Den som vill veta mera

kan läsa Lars Forsmans nytgivna bok *Esperanto... över 50 miljoner träffar*.)

Inför Lars Forsmans pensionering beslutade Karlskoga folkhögskola att lägga ner esperantolinjen. Några terminskurser finns inte längre, men sommarkurserna flyttade till Lesjöfors, också där med Lars Forsman som huvudlärare i flera år. Esperanto-Gården samarbetade några år med Karlskoga, senare också andra folkhögskolor, sedan några år med Brunnsvik. Stråvan har hela tiden varit att engagera bästa tänkbara lärarkrafter. Många minns sångkvällarna med Georgo Handzlik och Natasha Bertse, båda för övrigt med sedan Karlskogatiden.

Förutom de 25 kurserna har under senare år också enstaka sommarkurser med liknande uppläggning hållits i bland annat Göteborg, Oskarshamn och Visingsö. Sammanlagt blir mellan 30 och 40 sommarkurser.

Fastän mycket ser bra ut kan jag inte underlåta att citera en gästande europeisk lingvist:

– Är den svenska esperantörörelsen så stark att ni klarar att ordna flera sommarkurser?

Barngrupper

Det brukar sägas att barnen är vår framtid. Därför började Esperanto-Gården också med barngrupper redan 1997. Med lekar, teckningar, spel och teater har barnen övat sin språkanvändning.

Och för oss som kunnat följa sommarkurserna under någon tid har det varit extra trevligt och stimulerande när någon gått vidare från barngruppen, tagit sig över tröskeln och börjat tala esperanto.

Anmälan och ytterligare information om årets sommarkurs: <http://www.esperanto.se>, klicka på Sommarkurs vecka 28, 2011.

Bengt Nordlöf



LIBROJ

Pri la ekesto de nekredeble vigla movada vivo en Svedio

Stelsemantoj en la ora nordo. Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj. Katalin Kováts. Movado. E-duKati. Den Haag. 2011. 159 paĝoj. Prezo: €18.00 ĉe www.uea.org



Estas bone konata fakto inter esperantistoj en Svedio ke la 1930-aj jaroj estis "ora epoko" de esperanto. Ni aŭdis pri kursoj kun centoj da partoprenantoj, sed ni eble neniam aŭdis pri la kialoj de tiu forta ondo. Hungarino Katalin Kováts nun ebligis al ni ekscii pri tio.

Temas pri la nove aperinta libro "Stelsemantoj en la ora nordo. Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj". Ĝi unue rakontas pri Andreo Cseh (Ĉe), transilvania katolika pastro, kiu inventis novan "rektan" lingvo-instruan metodon, per kiu li ellaboris novan instrumaterialon por Esperanto. La Ĉe-instruistoj ne uzis lernolibrojn, sed parolis en Esperanto ekde la komenco. La kursanoj koruse respondis al iliaj demandoj.

Andreo Cseh varbis ankaŭ Tiberio Morariu kiel Ĉe-instruiston. Aliaj konataj Ĉe-instruistoj estis ekz. La estono Henrik Seppik. Ekde 1928 Tiberio Morariu faris preleg-vojaĝojn en dekoj aŭ centoj da lokoj en Svedio. La aranĝo preskaŭ ĉiam


estis simila. Unue oni anoncis prelegon pri interesa temo, kiu en la tempo antaŭ la ekesto de televido allogis dekojn aŭ centojn da homoj. La prelego estis farita en Esperanto. Iu tradukis ĝin kaj en la fino de la prelego oni invitis la aŭskultantojn partopreni en Esperanto-kurso, kiu komencos eble jam la sekvantan tagon. Alvenis dekoj aŭ centoj da homoj, kiu Ĉe-metode koruse respondis al la demandoj de la instruisto Morariu. Ĝis la fino de 1932 oni vendis 170 000 lernolibrojn pri Esperanto en Svedio (tamen ne nur pro la kursoj de Morariu).

En "Stelsemantoj en ora nordo" oni povas legi pri la agado de Morariu en diversaj lokoj, pri la kontaktoj kun Selma Lagerlöf, pri tio ke almenaŭ unu sveda princo studis Esperanton, pri la plua evoluo de la Esperantomovado post la treege intensaj 1930-aj jaroj, pri la privata vivo de Morariu kaj lia familio, kiu fakte devis pagi altan prezon por la vigla vojaĝado de la edzo kaj patro.

La libro estas pionira laboro, kiu rezultis en belega kaj grafike tre alloga libro. Ĝi ebligas al ni pli bone kompreni la historion de Esperanto en Svedio. Komprenible la libro ne estas kompleta. Mankas informoj pri la vizitoj de Morariu kaj aliaj Ĉe-instruistoj en multaj lokoj. Kiel eks-Kirunano mi ekzemple scias ke li vigle agadis tie, pri kio atestas poemo, kiun li verkis pri la norda urbo, kiu tamen aperas en la libro. Alia priesplora afero estas la rezulto de la amasaj kursoj. Kiom da homoj fakte ellernis Esperanton? Tute certe ne la 170000, kiuj aĉetis lernolibrojn. Ĉu eble kvin aŭ dek procentoj? Tion esploru aliaj. Katalin Kováts faris bonan laboron kaj belan libron.

Leif Nordenstorm

VIZAĜOJ Novelaro 2000-2009



La Verko de la jaro!

"...vere atentinda kaj liveranta adekvatan resumon de la Esperanto-literaturo 2000-2009."

Valentin Melnikov en Ondo de Esperanto

"Temoj de la rakontoj kompreneble varias; (---). Ĉiu verkinto prezentas ion malsaman, de mikroskenoj al pli longaj epizodoj, de momentaj sparkoj de ekstazo al lace treniganta familia vivo, kun timoj kaj konfliktoj. En la tuta volumeto regas pli multe meditemo ol entuziasmo; post ellego oni ne ja ridas, sed pripensas, kaj tion mi taksas atuto de la verko. Stiloj malsamaj, sed ĉiuj lingve senpekaj kaj same flua, kiel oportunas ĉe rakontado. Entute, tre rekomendinda.

Carlo Minnaja en Heroldo de Esperanto

La tutajn tekstojn de tiuj ĉi recenzoj kaj aliaj vi trovos en www.esperanto.net/literaturo

29 noveloj
179 paĝoj
200 svedaj kronoj
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförlaget
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054